

## & Duetto por violon' kaj aldo:

< Rekante 17 el 31 batoj por strofo, entute 310 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis David Samojlov (Naum Korĵavin, 1946?). El rusa tradukis Mikaelo Bronŝtejn. Baladige modifis melodion "Allegretto" de Mocart kaj aldonis novan rekantaĵon Martin Strid (2015).>

### (#Melodio:

<:31> (/domi so faamire mi lredo; Tidolmi so; falmire mi lreTi doLa doLa; SiLalTi do;

(#Rekantaĵe: mi Lafa re do reTi La; domi so faamire mi re;do Tidomi so faamire mi lreTi do)

)×10 )+

### (&Strofoj:

'1 /Mocart paŝis ebrie2ta ; al la2 hejm' ;  
e2n admi2ro malkvieta, ; fola2 plej.

(×: **Paŝu kontenta en la ĉen' ; Fluas tonoj en aero ; Mantenu ni firme kaj fie3re.)**

'2 Kaj la homojn gajokula ; ŝatis tre ;  
komponisto Mocart Wolfgang ; Amade'.  
.....

'3 Sonoretis foliaro ; de tili'. ; "Tili-tiki,  
tara-tara", – ; pensis li. ....

'4 Certe jes! Rutina bono – ; drinka  
vant'! ; Sed – duet' por violono ; kaj por  
ald'! .....

'5 Sian arton li disdonas ; sen repag'. ;  
Multajn sentojn li bezonas ; kun imag'!  
.....

'6 Komponisto Mocart Wolfgang, ; lerta  
vir' – ; donos, kiom homoj volas, ; laŭ  
dezir'. .....

'7 Ve! Enhejme plej verŝajne – ; draŝ',  
incit', ; kaj tutcerte por, semajno – ;  
nigra frid'. .....

'8 Sen ridet', sen parolsono ; muta halt'.  
; Sed – duet' por violono ; kaj por ald'.  
.....

'9 Jes! Do estu lia pago ; sen protest' ;  
por ĝuinda gaja blago ; en la fest', .....

'10 Por ebrio sen pardono, ; tutegal'! ; ja  
– duet' por violono ; kaj por ald'! .....